Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 28 novembro – 1 decembro**

# La Flamo de Esperanto

**28-a de novembro 2024, numero 3**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Pri KonSciU

★ Arno Lagrange

En la programero KonSciU, sepopo da homoj prezentis siajn esplorojn. La respektivaj prezentoj estis tre diversaj laŭ la temoj, kaj laŭ la formo, de nur parolado ĝis zorge pretigita bildaro.




Ankaŭ la teknikaj kondiĉoj estis iom malegalaj: iun el la prelegantoj ni apenaŭ povis kompreni pro tro multaj interrompoj de la konekto.


Inter la prezentoj iuj estis elstare altnivelaj, fare de spertaj fakuloj.

Ni nun atendas kiuj el ili estos premiitaj de la ĵurio.

## El la vidpunkto de ĵuriano

★ Amri Wandel

Tio estas la dua fojo kiam TEJO organizas la Konkuson por junaj Sciencistoj kaj Universitatanoj (https://mallonge.net/1hq). Al kvar ĵurianoj estis taskite prijuĝi la konkursantojn. Fine mi dankis la prelegantojn gratulante ilin por la ĝenerale zorge preparitaj prezentaĵoj. Ne estas facile prezenti sian esploron kaj imponi la ĵurion en tri minutoj (limo, kiun nur 4 el la 7 prezentantoj sukcesis ne trapasi), tenante bonan lingvaĵon kaj trafe respondi demandojn. Certagrade ĝi similas la taskon de IKU-proponoj, kiuj en duonpaĝo devas konvinki la IKU-komisionon pri la merito de sia propono, kaj aliflanke al la oratora konkurso: parola prezentado povas esti tre prema, des pli respondi ne antaŭviditajn demandojn de la ĵurio kaj la publiko. Tamen la profesia nivelo kaj la diverseco de temoj estis ĝenerale surprize altaj, kio certe malfaciligos la taskon de la ĵurianoj. Ekzemple, tre profesiecaj aspektis la prezentaĵoj pri "Ĉifroekonomio kaj bankrotoj", "Antaŭvidi sunradiadon kun nubaj fotoj kaj Artefarita Intelekto" kaj "Instruado de kvantuma fiziko ĉe lernejoj". La lasta



prezentanto eĉ faris kadre de la VK plenan prelegon pri la sama temo. Du prezentaĵoj temis pri Esperanto, kaj 2-3 temis pri personaj spertoj aŭ opinioj. La lingva nivelo de ĉiuj prezentantoj estis bona kaj ilia parolado fluis. La du afrikaj prezentantoj havis retkonektajn problemojn, kiuj tamen ne tro ĝenis taksi la prezentaĵon. La gajnontoj certe meritos la valorajn premiojn, kiuj inkluzivas senpagan aŭ rabatitan aliĝon al la Internacia Junulara Kongreso en Indonezio kaj al la UK en Ĉeĥio, IKU-libron kaj plurajn aliajn.

**Vi povas esti aŭtoro de *La Flamo de Esperanto*!**
**Por kontribui, skribu al la redakcio**

revuo.esperanto@gmail.com

# La rolo de literatura konkurso (INK) kiel medio por interkompreniĝo

Hodiaŭ, kadre de la 5-a VK, Stela Besenyei-Merger rakontis pri la INK-konkurso kaj Bobelarto. Por konstantaj legantoj de la VK-kurieroj kaj de la revuo *Esperanto* tiuj du nomoj jam estas laŭmerite konataj.

INK – Internacia Novela Konkurso – naskiĝis dum la unua kovima jaro kaj, kiel hodiaŭ diris Stela, iĝis ombrelo por aliaj projektoj de Bobelarto. La unua elsendo de la konkurso konsistis nur el esperantolingvaj rakontoj kaj nur el unu kategorio. La temo estis "KOVIM-19: Kiel ĝi ŝanĝis nin". La sekvan jaron kategorioj jam estis du, por profesiaj kaj por neprofesiaj verkistoj, kio certe aldonis kuraĝon al ne spertaj partoprenantoj. Al la lingvoj de la konkurso aldoniĝis la itala, rusa aŭ ukraina. La temo estis "Nokta vojaĝo". Jaron post jaro aldoniĝis aliaj lingvoj, en la kvina eldono, kiun nun vi povas partopreni, jam akcepteblas rakontoj ankaŭ en la franca, kataluna kaj persa. La temo de la kvina eldono estas "La detalo kiu ŝanĝas ĉion".

La INK-konkurso ricevas centojn da noveloj ĉiujare kaj krom oficiala ĵurio, kiu ricevas nur ĉirkaŭ cent elektitajn novelojn, kun tiu literatura lavango anticipe laboras internacia legokomitato. La tuta laboro pri INK estas en Esperanto, eĉ korespondado kun partoprenantoj ne-esperantistoj (krom iom da serva informo). Por sukcese komuniki ili uzas tradukilojn.

Ĉiuj gajnintaj, kaj ankaŭ kelkaj aliaj elektitaj noveloj, trafas la libron, apartan por ĉiu eldono, kie ĉiuj ne esperantlingvaj rakontoj aperas en Esperanta traduko (farita de bonaj tradukistoj) kaj en la originala lingvo. Certe tiu praktiko estas bonega reklamo de Esperanto, ĉar centoj da homoj ekscias pri Esperanto, kiel pri lingvo de literatura konkurso, kaj ĉiuj aŭtoroj, kies rakontoj trafas la libron, plezure fanfaronas pri tio en siaj blogoj kaj sociaj retoj, disvastigante informon pri la konkurso kaj pri Esperanto. Ja estas ĉiam honore kaj interese – vidi sian propran tekston tradukita en lingvon, kiun vi ne posedas!

Hodiaŭ Stela prezentis eĉ sufiĉe grandan nacian revuon kun artikolo pri juna knabo (infanoj rajtas partopreni INK kun permeso de la gepatroj), kiu gajnis Honoran mencion (la plej bona juna verkisto) dum la tria eldono de INK kun la temo «La sekreta vivo de miaj najbaroj». La novelo estis verkita en la kataluna.

Ricevinte diverslingvajn rakontojn el ne esperantlingva mondo, INK havas tre noblajn celojn, ne nur reklami Esperanton, sed montri, ke Esperanto estas ne nur parolata, sed vere literatura lingvo, al kiu facile tradukeblas io ajn, ke ekzistas originala Esperanto-leteraturo, kaj ene de unu konkurso esperantlingvaj noveloj egale konkursas kun noveloj verkitaj en multaj aliaj lingvoj. Kaj ankaŭ montri kiel bone Esperanto servas kiel ponto-lngvo kadre de komunikado inter la teamo kaj diverslingvaj partoprenantoj.

Nun, atendante la rakontojn por la kvina eldono, la teamo de INK laboras pri la kvara, kies temo estas "Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens". Interalie, aŭtoroj rajtas uzi AI kadre de la verkado, sed tion necesas mencii en la komentoj. La gajnintoj de tiu eldono, kiel ĉiam, estos anoncitaj dum la UK kaj ricevos monpremion.




Krom INK Stela prezentis aliajn projektojn de Bobelarto (vd. la bildon), kiuj certe meritas atenton de ĉiuj literaturemaj homoj: se vi ŝatas verki, partopreni verkmonatojn, paroli kun verkistoj, voĉlegi bonajn librojn, vizitu https://bobelarto.ink. Vi certe trovos tie multon interesan.

Kiel diris Stela, ni amas literaturon, kaj ni aparte amas modernan literaturon, ĉar ni volas aŭdi voĉojn, kiuj sonas nun.



# Letero de leganto

## Julio Baghy: *Sonĝe sub pomarbo*

*(fragmento)*

**Monologo de Strigo**

La Vivo ŝajnas monstra maro;
sur ĝi la homo – ludoŝip'.
Ne gravas kvanto de la varo
nek la kvalito, nek la tip'.
La ŝipo serĉas rodon; fate
ĉe bordo perdiĝas ĉiam cel';
do ondfrapite sortpelate
ĝi velas plu kun dub', esper'
kaj ek laŭtajde ondorajde
de ondosupro al ondvalo
ŝanĝinte ofte revojn trajte,
sed nesciante pri kialo.
Kialon senlimec' ne havas,
(la monstra maro ludas nur)
la ŝipon lulo, skuo trafas;
ĉe ĉiu ondo – aventur'.
La Homo, estro de la Ŝajno,
imagas sin ja suveren',
nur pensas pri la ebla gajno,
disipas forton en la pen'
kaj ek plenvele novacele
nescie pri la ŝiporompo
li drivas fide kaj sinpele
ĝis glutas lin la – ondotombo.



Esperantistoj denove kongresumas. Universala Esperanto-Asocio aranĝas jam la kvinan fojon Virtualan Kongreson – dum kvar tagoj esperantistoj de ĉiuj kontinentoj, de pli ol cent dudek landoj renkontiĝas perrete tutmonde – la suno ĉiam ja brilas – programoj daŭras dum la tuta tago dudekkvarhore.

La ekstera Mondo konfrontas danĝerojn ankoraŭ ne vidatajn – kiel Sándor Petőfi diris en sia poemo *La juĝo* (1847) :

Vidas tagojn mi teruregajn, proksimiĝantajn,
kiajn vidis Mond' ja neniam...!

La historiaro de la Homaro laŭ li prave estas sango-rivero:

„Kio la historiaro mem estas? Sango-rivero,
kiu ekintas sur nebulegaj rokoj iamaj,
kaj ĝi sen interromp', unulonge, la nunon atingas.
Oni ne kredu, ke jam malaperis, jam ĝi ripozas,
flu' ekirinta ja ĉesos sole je sin' de la maro.
Longa rivero de sang' enfalos sango-maregon....”

Mia komuniko estas granda Vekrio kontraŭ la frenezo – tiu „ondotombo” ne estu la koŝmaro de la Tria Mondmilito.

Mi antaŭdankas Vin pro via pacienco kaj bonvolo.

**Altestime kaj amike, István Szabolcs,**
**komitatano A de HEA**



# La Akademio respondas...

**Brian Moon, Probal Dasgupta, Bertilo Wennergren, François Lo Jacomo**

Prestiĝa institucio fondita en 1905, la Akademio de Esperanto nun plenumas gravan laborplanon, pri ĝenerala vortaro, gramatiko ktp... kun kutimaj demandoj, ĉu ĝi devas gvidi la evoluon de la lingvo aŭ konstati kaj oficialigi ĝin. 2025 estos elekto-jaro, dum kiu ĝi (re)elektos trionon de la akademianoj, kaj novaj homoj kandidatiĝas. Kiel en ĉiuj kongresoj, la Akademio respondos al la demandoj de la publiko.

AdE
AKADEMIO DE ESPERANTO

**Sabato, la 30-a de novembro 2024**
**UTC 14:00 – 15:30**

**Atentu!**
La prelego pri la AntaŭKongresa Safario en Tanzanio de Amri Wandel, kiu devis okazi la 29-an de novembro, okazos dimanĉe, la 1-an de decembro, je la 12:00 UTC.



# UEA respondas




Estraranoj de Universala Esperanto-Asocio (Duncan Charters, Fernando Maia Jr., Amri Wandel, Aleks Kadar, Arko Gong, Aurora Bute, François Lo Jacomo, Jérémie Sabiyumva, So Jinsu) kaj la Ĝenerala Direktoro (Martin Schäffer) akceptos la membrojn por respondoj al demandoj pri UEA.

**Sabato, la 30-a de novembro 2024**
**UTC 12:00 – 13:30**

# Aimé Patrick Manirakiza

La indiĝena komunumo reprezentas 2% de la burunda loĝantaro, sed ili estas malriĉaj kaj meritas subtenon. La Ministro de Solidareco kaj Homaj Rajtoj dankis la burundan esperantistaron pro la fakto ke ni subtenis indiĝenajn infanojn. Ŝi petis, ke ni estonte organizu Esperanto-trejnadon por instruistoj ĉar ŝi trovis, ke la lingvo Esperanto estas lingvo de paco , unueco kaj amo.

**Sabato, la 30-a de novembro 2024**
**UTC 13:00 – 13:45**

**1096 personoj el 89 landoj (aŭ teritorioj) jam aliĝis al la 5-a VK!**

**Se vi ankoraŭ ne aliĝis, tion eblas fari en la paĝo:**

**https://vk.esperanto.net/2024/aligxilo**

**Invitu partopreni ankaŭ viajn esperantajn familianojn, kolegojn kaj amikojn!**